

# Novajaĵoj Tamtamas

横浜エスペラント会のエスペラント文会報

Internacia Gazeto de Jokohama Esperanto-Rondo (JER, Hama-Rondo)

## Aperas vizaĝoj novaj kaj denovaj!



\*Rudimenta kurso komenciĝis de la 19a de aprilo por 12 semajnoj, ĉiusabate, gvidate de s-ro Fuse Kentarou. Ĝi havas 3 gejunulojn --- kio estas malofta lastatempe.

\*De aprilo, denove regule vizitas nin kelkaj lernintoj iamaj. S-ro Izumi Satosi aliĝis al la klaso por legado de "Vivo de Lanti", kaj s-ino Moriya Sigeko aliĝis al la merkreda klaso.

## Niaj Klasoj kaj Kursoj

En Kanagaŭa-Kenmin Sentaa (= Centro por la gubernianoj de Kanagawa), ĉirkaŭ la Stacidomo Yokohama, okazas jenaj klasoj.

\*Regulaj Klasoj en sabato: (1) Meza klaso gvidata de Doi Ĉieko; oni lernas jen legante artikolojn, jen verkante, jan tradukante / (2) Klaso por legado de "Vivo de Lanti" / (3) Jokohama Salono / (4) Rudimenta kurso

\*Regula Klaso en merkredo: (1) legado de "Barbro kaj Eriko" finita, kaj sekvas "Karlo" / (2) Daŭriga kurso

## TIEL OKAZIS

### en Hama-Ronda Vespere

\*la 19-a de aprilo, 17h00-19h00, ĉe la regula kunvenejo

Ni havis 2 temojn ĉi-vespere, klarigitajn en la japana lingvo.

(1) La unua paŝo en la hispana lingvo, de s-ino Motoyosi Akiko.

La parolanto estas fininto de la rudimenta kurso esperanta, sed ŝi havas longan karieron uzante la hispanan lingvon, restante jarojn en mezamerikaj landoj, kaj ankaŭ vizitis Argentinon. La parolo estis motivita de ĉi-jara UK en Argentino. Oni lernis kelkajn salutojn kaj dialogojn praktike uzeblajn.

(2) Esperanto en Afriko, de s-ino Doi Ĉieko.

Estis ĝenerala trarigardo pri Afriko el la movada vidpunkto. Jam en la fina jardeko de la 19a jarcento, Esperanto estis portita en afrikajn landojn per eŭropanoj. La moderna movado de la propraj loĝantoj ekis de la fina jardeko de la 20a jarcento. La parolanto montris diversajn librojn, ĉu de afrikanoj mem, ĉu de vojaĝintoj en Afriko. Per la bone preparitaj ekranaj bildoj kaj efektivaj libroj, la temo estis klare montrita.

■ Eldonas Sibayama Zyun'iti ■ Redaktas la organa fako de JER: Sibayama Zyun'iti  
 ■ Poŝtadreso: n-ro 85 CPO, Yokohama, Japanio (JP-220-8691) ■ Telekopio: +81-45-785-5458  
 ■ Redaktejo: tamtamo@googlegroups.com ■ TTT-ejo: <http://www.hamarondo.org>  
 ■ Abono: jare 1500 enoj, aŭ 10 eŭroj ■ uea-konto: jokr-j (Jokohama Esperanto-Rondo)

## NIAJ PLANOJ

### Venontaj Hama-Rondaj Vesperoj

\*la 17-a de majo, 17h00-19h00, ĉe la regula kunvenejo

Pri la itala urbo Bolonjo parolos s-ro Glauco Pompilio. Li devenas de tiu ĉi urbo.

\*la 21-a de junio, 17h00-19h00, ĉe la regula kunvenejo

Pri la retejo de nia rondo parolos s-ro Nanba Humiharu, la zorganto de la retejo. Laŭ li, la retejo estas modifebla de tiuj, kiuj konas pasvorton. Do ni lernos kiel fari tion.

### Legokunsido pri Komikso

\*la 6-a de junio, 13h00-15h00, ĉe la regula kunvenejo

Ni traktos libron “Rakonto de Ovoj”. Ni unuafoje en la historio de legokunsido traktos komikson.

## NOVAĴOJ JOKOHAMAJ

### Ŝipego apenaŭ krozis sub ponto

Luksa brita pasaĝerŝipo *Queen Elizabeth* (= Reĝino Elizabeta) vizitis la urbon Jokohamo dum sia tutmonda krozado. Ĝi estas la 3a ŝipo kun la nomo de tiu reĝino, krozanta ekde 2010. Ĝi alkajiĝis al la Granda Kajo de la pasaĝera haveno Jokohamo en la 16a de marto, kaj dekajiĝis en la 17a. Multaj urbanoj vizitis la kajon por rigardi la ŝipegon, kiu povas gastigi pli ol 2000 pasaĝerojn. Ĝojinda afero, sed por tio oni devis konkeri malfacilaĵon.

La pasaĝera haveno estas profunde de la Golfo Jokohamo, kiun ŝtopas aŭtovojo kun pendoponto nomata *Yokohama Baybridge* (=Jokohama Golfoponto), finkonstruita en 1989. Ĝia plejalta parto estas 55 metrojn super la meza marnivelo, konsiderata sufiĉa por tiamaj ŝipegoj. Fakte, tiama ŝipego, la 2a *Queen Elizabeth* estis 52 metrojn alta. Sed la nuna, la 3a QE estas pli alta! Jam okazis en 2009, ke pasaĝerŝipo *Queen Mary 2* (= Reĝino Maria 2a), 72 metrojn alta, ne povis transiri sub la ponto, kaj ĝi alkajiĝis al la kargohaveno Daikoku, atingebla sen iro sub la ponto.

La 3a QE estas 294 metrojn longa, kaj 56,6 metrojn alta super akvo. Por la ŝipo pli oportune estas rekte alkajiĝi al la urbocentra kajo. Tial la 3a QE devis atendi malfluson por eniri kaj eliri la pasaĝerhavenon.

(SIBAYAMA Zyun’iti)



foto de 663highland  
- Wikipedia - CC BY 2.5

---



---

## ESEO

---



---

### Ĉirkaŭ “Printempo en la Aŭtuno”

Aida Yayoi

Por la marta legokunsido de Hamarondo estis elektita “Poemoj de Armand Su” kiel la teksto. Leginte la antaŭparolon mi eksciis, ke

tiu ĉi poeto estis profunde influita de la verko “Printempo en la aŭtuno” de Julio Baghy, kiu “nomis lin sia Esp-poezia filo”. Mi tuj elprenis el

mia libro-breto la koncernan libron, malpezan, nur 114-paĝan, eldonitan en Germanio en 1931. Laŭ mia noto mi aĉetis la libron en Gotenburga UK en 2003, kaj eklegis tuj sed baldaŭ interrompis legadon pro senintereso. Profite de ĉi-foja legokunsido, mi pli-malpli finlegis kaj povis kompreni kial la ĉina poeto tiel ameme emociiĝis de la verko "Printempo en la Aŭtuno". Mi tamen ne skribos pri tio, sed anstataŭe kelkajn anekdotojn pri la libro mi volas tuŝi ĉi tie.

Kiam mi aĉetis la libron "Printempo en la Aŭtuno", la deĵoranto de la libroservo de la UK estis Anna Lowenstein, kun kiu mi foje interparolis pri ŝia verko "La ŝtona urbo". Ŝi rekomendis la libron dirante, ke ĝia valoro altiĝos en estonteco. Mi estis hezitema, ĉar la libro havis multe da enskribaĵoj en la preskaŭ ĉiu marĝeno per por-mi ne konataj literoj, eble tiuj el norda-aŭ-centra-eŭroplingvo. La skribinto ŝajne estis tre diligenta sed ne-progresinto, se juĝi laŭ la substrekitaj vortoj kaj iliaj traduknotoj. Dankante la amikan konsilon de s-ino Lowenstein kaj iom interesiĝante pri tiuj

enskribaĵoj, mi fine aĉetis la libron.

Krom tiu epizodo estis ankaŭ memorinda afero pri la libro. Sur la fronta paĝo ĝi havas subskribon de Marjorie Boulton. Onidire ŝi havis intiman rilaton kun Baghy. Ekvidinte s-inon Boulton en la kongresejo, mi aŭdace petis ŝin subskribi en la libron. Post iom da hezito ŝi konsentis al mia peto. Sub la titolo "Printempo en la Aŭtuno" ŝi skribis sian nomon kaj parenteze "Gotenburgo"-n. Tiam ŝi vestis sin per blua (aŭ viola) robo elegante. Verdire mi volus etendi alian libron, t.e. "Poeto Fajrakora" verkita de ŝi mem pri Baghy, sed bedaŭrinde mi ne havis la libron tiam.

La titolon, "Printempo en la Aŭtuno" mi tradukis japanen 「小春日和 (Koharu Biyori)」 kun tenera imago. Sed ĉi-foja tralego rimarkigis al mi, ke mia japanlingva titolo estas eraro, ne taŭga por esprimi celatan temon de la verko. En la originalo printempo akre kontraŭstaras al aŭtuno. Tio ne simbolas japaneskan mildecon sed ardan sopiron al denova renkontiĝo inter junaj geamantoj. (2014 3.8.)

---

## BELETRO

---

### Sovaĝa rozo (野ばら)

verkita de OGAŬA Mimei  
tradukis AIDA Kiyoshi

Granda lando kaj malgranda lando staras en najbareco. Dum kelka tempo inter la du landoj nenio okazis kaj daŭris paco.

Ĉi tie estas landolimo for de ĉefurbo. De la du landoj estis sendita po unu soldato kaj ili gardis la ŝtonan monumenton fiksitan kiel landlimon inter la du landoj. La soldato de la granda lando estis maljuna. La soldato de la malgranda lando estis juna.

Du soldatoj reciproke gardis dekstre kaj maldekstre de la monumento. La loko estis en tre soleca monto. Preskaŭ neniuj vojaĝantoj venis en ĉi tiun lokon. Komence la du ŝajnis ne malamikoj nek amikoj, dum ili estis nekonatoj kaj preskaŭ ne parolis unu la alian. Sed ili fariĝis amikoj de iam, ĉar ili enuiĝis pro senŝanceco interparoli. Printempa tago estis longa kaj la suno serene brilis sur iliaj kapoj.

Ĝuste ĉe la landlimo unu sovaĝa rozo kreskis. Al la floroj svarmadis abeloj de frua mateno, kaj la flugbruoj aŭdiĝis rave al la oreloj de la du soldatoj dum ili estis dormantaj.

"Nu, vekigu nun. Multaj abeloj venis tien." La du vekigis kvazaŭ interkonsentite. Kiam ili iris eksteren, la suno vigle brilis sur la pinto de arbo. La du soldatoj iris al fonto por gargari sin kaj lavi la vizaĝon al si per la pura akvo fontinta de la roka fendo, kaj tie ili renkontiĝis vizaĝ-al-vizaĝe.

"Saluton, bonan matenon! Estas bona vetero."

"Tre agrabla vetero. Se estas bona vetero, estas agrable al mi."

Tiel la du parolis sur vojo. Ili rigardis la ĉirkaŭan pejzaĝon levante la kapon. Eĉ la pejzaĝo, kiun ili vidas ĉiutage, donas al ili freŝan sentimenton.

Komence la junulo ne sciis kiel ludi japanan ŝakon, ŝogion. Sed li lernis ĝin de la maljunulo kaj lastatempe ili ludis ĝin vizaĝ-al-vizaĝe dum serena tagmezo ĉiutage.

En la komenco la maljunulo estis plej forta kaj ludis ŝogion kun handikapo. Finfine la maljunulo foje perdis matĉon sen-handikape.

La junulo kaj la maljunulo estis tre bonkoraj, honestaj kaj komprenemaj homoj. Ili fervore konkuris en ŝogi-ludo, sed ili estis amikaj en koro.

“Hej, mi ŝajne estis venkita. Miaj ŝakpecoj turmentite fuĝis tien kaj tien. Se mi estus en vera batalo, mi estus ege turmentata.” — ridis laŭtavoĉe la maljunulo. Dume la junulo mienis kompreneme, ĉar li havis ŝancon por venk ilin. Kaj li matigis la reĝon de la alia flanko briligante siajn okulojn.

Birdetoj kantis amuze sur la pinto de arbo. Aromo venis el blankaj rozfloroj.

Vintro ankaŭ troviĝis en la lando. Kiam la severa vintro venis, la maljunulo sopiris la sudan regionon.

En la sudo loĝis liaj filo kaj nepo. “Pli frue mi volas elpeti forpermeson kaj reveni hejmen.” — diris la maljunulo.

“Se vi reiros hejmen, nekonato venos ĉi tien anstataŭe. Se li estos komprenema kaj bonkora kiel vi, mi bonvenigos lin. Sed se li havos ideon pri malamiko aŭ amiko, mi estos embarasita. Bonvolu resti ĉi tie dum kelka tempo. Baldaŭ printempo venos.” — diris la junulo.

La vintro jam forpasis kaj venis la printempo. Ĝuste tiam okazis la batalo inter la du landoj pro antagonismo pri ekonomia problemo. Pro tio interrilato de la du soldatoj, kiuj vivis amike ĉiutage ĝis nun, fariĝis amiko kaj malamiko. Tiu rilato estis konsiderata kiel stranga.

“Nu, vi kaj mi fariĝis malamikoj unu al alia de hodiaŭ. Mi estas majoro, malgraŭ ke mi estas tiele maljuna. Se vi kunportus mian kapon, vi povus esti promociita. Bonvolu mortigi min.” — diris la maljunulo.

Aŭdinte tion la junulo kun nekredibla mieno diris, “Kial vi diris absurdaĵon? Kial mi kaj vi estas malamikoj? Miaj malamikoj devas esti en alia loko. La batalo komenciĝis en la plej norda regiono. Mi iros tien por batali”. Dirinte tion li forlasis la lokon.

Ĉe la landlimo nur unu maljunulo restis postlasita. Post kiam la junulo forlasis la lokon, la maljunulo pasigis tagojn konsterniĝe. La sovaĝaj rozoj ekfloris kaj abeloj svarmadis tien kaj reen de mateno ĝis vespera krepusko. Ĉar la milito okazis en fora loko, ne aŭdiĝas pafsono, kaj nigra fumo estis nenie trovebla. La maljunulo maltrankviliĝis pri la junulo post la komenco de la milito. Tagoj pasis tiele.

Iun tagon vojaĝanto pasis tien. La maljunulo demandis lin pri la milito. La vojaĝanto respondis, ke post kiam la malgranda lando estis venkita kaj la soldatoj estis ekstermitaj, la milito finiĝis.

La maljunulo pensis, ke la junulo mortis. Maltrankviliĝinte la maljunulo mallevis la kapon sidante sur la fundamento de la ŝtona monumento kaj baldaŭ dormetis. De fore estis signo, ke multaj homoj venos. Li vidis unu kolonon da soldatoj. La komandanto rajdanta sur ĉevalo estis tiu junulo. La trupo estis tre silenta kaj muta.

Kiam la junulo pasis antaŭ la maljunulo, li okulsalutis kaj snufe flaris la odoron de sovaĝa rozo.

Apenaŭ la maljunulo alvokis ion, li vekiĝis. Tio fakte estis la sonĝo. Unu monaton poste la sovaĝa rozo velkis. En la aŭtuno de tiu jaro la maljunulo reiris hejmen en la suda regiono elpetante forpermeson. *(fino)*

### Pri la aŭtoro

Ogaŭa Mimei (小川未明 1882~1961) estis novelisto kaj infanliteratura verkisto, naskiĝinta en la urbo Takada (nuna Ŝoecu) en la gubernio Niigata. Li diplomiĝis el la altlernejo de Takada kaj Universitato Waseda (Ŭaseda). Li gajnis la postenon novelistan pro la novelo “Hajlo kaj neĝpluvo” en 1904. En la jaro 1926 li decidis verki nur fabelojn. Li fariĝis la unua prezidanto de Japana Infanliteraturo-Asocio en 1946. Li ankaŭ akiris la Kulturmeritan Premion en 1951, kaj fariĝis akademiano en 1953. Liaj reprezentaj fabeloj estas “Ora ringo”, “Ruĝa kandelo kaj marvirineto” kaj “Sovaĝa rozo”.